

TELOPEO

La Oficiala Gazeto de La Esperanta Federacio de
Novsudkimrio

Telopeo Volumo 57, Numero 02
merkrede je la tridek-unua de marto 2021
Esperanto House 143 Lawson Street REDFERN NSW 2016 AUSTRALIA
Redaktoro: Maria TERANO, Provleganto: Kiah MORANTE

Enhavo

Telopeo	1
1 Esperanto en Mezlernejo _____	2
2 Domaj Merkatoj _____	4
3 Infanlibroj de D-ro Seuss _____	7
4 Minimumismo — Parto Dua _____	9
4.1 La 30-Taga Minimumisa Ludo	10
5 Ŝakludturniro _____	11
EFNSK	12

Esperanto en Mezlernejo

Jonathan COOPER, kasisto de EFNSK

Oni ofte aŭdis esperantistojn diri, ke Esperanto devus esti instruata en lernejoj, sed bedaŭrinde multaj tiaj provoj malsukcesis. Instruistoj kaj lernejestroj ne povas, aŭ ne volas, komenci ion sen oficiala aprobo de la sistemo, kiu administras la lernejon.


Do, kia surprizo kiam lingvo-instruisto de Newington College STANMORE, sendis retleteron al AEA, demandante ĉu iu en la Asocio pretus paroli al klaso de knaboj en gradoj 9 kaj 10, kiuj jam komencis lerni Esperanton per Duolingo. Ili studas en nova elekta unu-trimestra kurseto, nomita «Komunumo de Lingvoj». Mi tuj respondis, ke mi feliĉus veni kaj paroli al la lernantoj.

Do, merkrede je la tria de marto 2021, mi veturis per trajno de Gosford al Newington College. Post kiam mi alvenis, Julia GONZALES, la instruisto, informis min, ke ankaŭ lernantoj de alia kurseto, «Popkulturo», kaj kelkaj aliaj instruistoj, venos al la sesio.



La unu-hora prelego respondis al diversaj demandoj inkluzive de la jenaj: Kiel kaj kial Esperanto fondiĝis? Kiel oni povas uzi ĝin? Kiamaniere ĝi estas brila? Kiel sukcesa ĝi estas en la mondo? La lernantoj (kaj la instruistoj) tre interesiĝis kaj ankaŭ ĝuis rigardi la diversajn librojn kaj revuojn, kiujn mi alportis. Tri knaboj aparte interesiĝis pri la Esperanta Biblio, serĉinte specifajn versojn.

Je la fino de la prelego, lernanto, nome de la klaso, donis al mi karton (kun mesaĝo en Esperanto) kaj botelon da vino.



Poste, Julia diris al mi, ke Esperanto eble iĝos plena kurso, se sufiĉaj lernantoj elektos ĝin. Tio estus tre interesa!

Domaj Merkatoj

Maria TERANO, membro de EFNSK

Iu antaŭ nelonge demandis al mi: «Ĉu sendomeco estas la kulpo de la sendomulo, aŭ la registaro?» Unu flanko estas: «Aŭstralio havas pli bonan sistemon ol en Usono, tiel se iu dormas strate en ĉi tiu lando, verŝajne estas elekto de vivstilo.» La alia flanko: «Aŭstraliaj politikoj ne perfektas, se politikoj ekzistas, kiu malgrandigus la problemon, kaj la registaro rifuzas realigi tiujn politikojn, tiam certe la registaro havas iom da kulpeco.» Senkonsidere la lokojn pli malbonajn, ni klopodas atingi rezultojn tiel bonajn kiel eblajn, ĉu ne? Sed eble la demando mem ne gravas. Kial kulpigo gravas? La solvoj certe devus esti la plej grava temo.

Kaj ĉi tiu temo estas grava. La plejmulto de junuloj en Aŭstralio verŝajne neniam povos aĉeti domon kiel la generacioj antaŭaj. En preskaŭ ĉiuj urboj estas pli da neuzataj domoj ol sendomuloj. Tiel sendomeco estas kreita, kiel merkatoj, kaj ni povas reformigi ilin malsame. Memoru, ke privata posedeco ne ekzistis en Aŭstralio antaŭ la invado! La angla imperio invadis kaj privatigis la terpecaron. La ĝustigo de ĉiu posedeco estas el tiu originala peko, «Mi aĉetis la domon el iu, kiu heredis ĝin el la praulo. . . Kiu laŭleĝe murdis indiĝenojn por ĝi.» Ĉu justus manĝi la riĉularon, kiel ili misuzas nin?

Oni ofte aŭdas pri ekvilibro inter tro multe aŭ tro malmulte da «reguloj de la merkato». Sed, kial la kvanto de reguloj gravas por civitanoj? Certe onin pli koncernus regulo mem, oni aprobus kelkajn regulojn kaj malaprobus aliajn. Ĉiufoje ke la registaro forigas la regulojn de sia doma merkato, domaj krizoj tuj okazis.

Politikistoj ofte deklaras «merkatoj estas efikaj». Sed. . . Por kiu celo merkatoj efikas? Laŭ la leĝo de Hotelling porprofita konkura merkato inklinas al malfavoraj rezultoj por konsumantoj. [1] [2] Por ke redisdoniĝu riĉeco en la manojn de la jamaj riĉegularoj, certe merkatoj havas efektivan rezulton. Tamen pli taŭga celo estus bonfarta societo, en kiu malplimultaj malsatas, en kiu la porvivaĵo efektiviĝas. La merkatoj volas, ke ĉio estu varoj por komerci. Laŭ ili la rajto profiti el ekspluatado estas pli alta en la hierarkio ol la rajto de porvivaĵo kiel domeco. Ni centrigu la viktimojn!

La «libera merkato» estas mito, estas mensogo dirata al ni el la riĉularo, estas la religio de novliberalismo. Pruvo ne ekzistas, ke tiaj merkatoj helpas la popolon. Subtenanto de tiaj merkatoj dirus: «Rigardu al Sovetio! Rigardu al Kubo! Malriĉaj landoj.» [3] Por ĉiu lando malriĉa sen tiaj merkatoj, aliulo povas priskribi ekzemplon de malriĉa lando kun tiaj merkatoj.

En nia nuna ekonomio, merkataj malsukcesoj okazas proksimume po unu dekjare, La “.com” bobelo, la Tutmonda Financa Krizo (la Granda Recesio de 2008 pro manko de reguloj pri usonaj hipotekoj) kaj la nuna kronviroza krizo. Se ia krizo okazas akurate, tiam ne reale estas miso, estas trajto. Tiaj depresioj ne okazis antaŭ kelkjarcentoj en Aŭstralio. Depresioj ne estas neeviteblaj faktoj de naturoj, estas politikaj elektoj, kaj ni rajtas decidi aliajn politikojn.

Ekzemple imposto por neuzataj terpecoj por malstimuli vetadon, [4] terpeca imposto, aŭ Universala Baza Enspezo. [5] Aliaj ideoj estas organizaĵoj, kiuj provizas domecon por la profito de siaj membroj. Ekzemple komunumaj ter-trustoj (membroj demokratie posedas la organizaĵon, kiu posedas terpecojn), [6] reciprokismaj konstruaj-societoj (organizo estas financa), aŭ eĉ terpecaj bankoj (ŝtato estas la posedanto anstataŭ membroj). [7]

Mondo kun senpagaj panoj kaŭzus, ke depresioj malpli grande tuŝas la loĝantojn. «Ĉu domeco apartenas al homaj rajtoj? Ĉu domoj devus senpagiĝi filozofie?» Ne gravas. Simple agnosku, ju malpli multekostaj estas domoj des pli bone, kaj se domoj senpagus, tiam la rezultoj por la loĝantoj pliboniĝus! Simple utilismo. Ni elektu la eblon kun la plej bonaj rezultoj!

Mi proponus ekonomion kun alia celo, kiu provas pliebligi utilecon por la plej granda kvanto da koncernatoj. Merkatoj baze celas pli da riĉeco al la riĉularo. «Pligrandiĝo por pligrandiĝo mem estas la ideologio de kancero.» [8] Kune ni povas krei sistemon, kiu zorgas popolon mem anstataŭ profiton de privilegia kelko.

Citaĵoj

- [1] Presh TALWALKAR. *Why are McDonald's and Burger King usually located near each other? Fast food location game theory.* <https://mindyourdecisions.com/blog/2012/10/23/why-are-mcdonalds-and-burger-king-usually-located-near-each-other-fast-food-location-game-theory/>. Vidite merkrede je la tridek-unua de marto 2021. Oktobro 2012.
- [2] Ken STEIF. *Why are McDonald's and Burger King usually located near each other? Fast food location game theory.* <https://www.planetizen.com/node/65765>. Vidite merkrede je la tridek-unua de marto 2021. Oktobro 2013.
- [3] Gerry BILL. *Homeless in Cuba? Not Likely.* <https://fresnoalliance.com/homeless-in-cuba-not-likely/>. Vidite merkrede je la tridek-unua de marto 2021. Septembro 2011.
- [4] Australian Taxation Office. *Annual vacancy fee.* <https://www.ato.gov.au/General/Foreign-investment-in-Australia/Annual-vacancy-fee/>. Vidite merkrede je la tridek-unua de marto 2021. Marto 2020.
- [5] Chelsea Rae MOSES. *Universala Baza Enspezo/Universal Basic Income.* https://www.youtube.com/watch?v=XtPTj53d_3I. Vidite merkrede je la tridek-unua de marto 2021. Januaro 2021.
- [6] National CLT Network. *Community Land Trusts - Building the homes we can afford.* <https://www.youtube.com/watch?v=ujaSjnFSHTY>. Vidite merkrede je la tridek-unua de marto 2021. Februaro 2016.
- [7] Korea Land and Housing Corporation. *About LH.* <https://www.lh.or.kr/eng/contents/cont.do>. Vidite merkrede je la tridek-unua de marto 2021.
- [8] Edward Abbey. *The Journey Home: Some Words in Defense of the American West.* <https://www.goodreads.com/quotes/21664-growth-for-the-sake-of-growth-is-the-ideology-of>. januaro 1991.

Infanlibroj de D-ro Seuss

Nicole ELSE, sekretario de EFNSK


Mi ne povas kredi kiom da stultaj personoj ekzistas. Antaŭ kelkaj tagoj estis anonco, ke 6 libroj de D-ro Seuss ne plu estos publikigitaj, ĉar ili havas rasistajn bildojn. Nu, mi rigardis la librojn kaj en iuj mi tute ne povas trovi, pri kiuj bildoj temas. En unu libro ja estas bildo de aziano kun bastonetoj (haŝioj), sed ĉu vere tia bildo estas rasista?

Nu ne vere pri tio mi volas skribi, sed pri la fakto, ke nun ĉiuj deziras aĉeti tiujn 6 librojn kaj pretas pagi frenezajn sumojn por ili. Mi mem iris al librofoiro hieraŭ (sabate je la sesa de marto 2021) kaj trovis tie 5 el tiuj libroj por \$2/libro. Nu mi aĉetis ilin kaj decidis revendi ilin por \$40/libro. Post malpli ol 24 horoj ĉiuj 5 ja estis venditaj. Unu persono kontaktis min kaj eĉ skribis, ke mi estas freneza revendi tiujn librojn por nur \$40/libro, ke mi povus vendi ilin en eBay por pli ol cent dolaroj.

Tamen tio ne plu eblas, ĉar eBay rimarkis la frenezajn prezojn kaj malpermesas nun la vendadon de tiuj libroj. Tamen ili ne rimarkis ĉiujn anoncojn kaj ja ankoraŭ estas kelkaj kaj amaso da personoj provas aĉeti ilin. Kial diable? Mi supozas, ke ili pensas, ke la libroj estos altvaloraj. Sed tiuj libroj estis eldonitaj dum jaroj kaj jaroj en amasa kvanto, do certe post kelkaj monatoj ili ne plu valoros multon.

D-ro Seuss verkis multajn bonegajn amuzajn librojn. Komence de decembro mi provis vendi tiujn librojn por proksimume \$2,50 aŭ \$3. Ĉu vi pensas, ke mi vendis kelkajn el tiuj bonegaj libroj dum la pasintaj 3 monatoj? Eĉ ne unu. Eĉ nun neniu interesiĝas pri bonegaj libroj de D-ro Seuss, kiuj kostas nur \$3, ĉiuj volas aĉeti nur la «malpermesitajn» eĉ se ili kostas pli ol \$100.

Mi aldonas bildon montrante, ke unu el tiuj libroj estis aĉetita sur eBay hieraŭ por \$145.



Sold 6 Mar 2021
BANNED BOOK DR SEUSS SCRAMBLED EGGS SUPER Softcover Harper Collins
Pre-owned
AU \$145.00 Mar-6 14:38
Buy It Now
Free postage
[View similar active items](#)
[Sell one like this](#)

Ĉu vere ekzistas tiom da riĉuloj en Aŭstralio, kiuj povas elspezi pli ol 100 dolarojn por infanlibro, kiu estis eldonita en amasa kvanto? Mi suspektas, ke multaj el tiuj stultaj personoj ne vere estas riĉaj kaj eble devus uzi sian monon por pli gravaj aferoj, sed eble ili ja vivas en la espero, ke ili riĉiĝos se ili aĉetas tian libron kaj revendos post kelkaj jaroj.

Kia freneza socio, en kiu sufiĉas diri, ke iu libro ne plu estos eldonita, por ke subite ĉiuj (nu ne vere ĉiuj, sed multaj) deziras posedi tiun libron.

Minimumismo — Parto Dua

Doris DOLA, membro de EFNSK

En moderna kulturo, estas agnoskata, ke posedado de multaj aĵoj signifas riĉan kaj bonan vivon. Homoj kredas, ke ju pli da aĵoj ni posedas, des pli bonan vivon ni havas. Ĉar ni estas en la mondo plena de reklamoj, kiuj cerbolavadas nin por aĉeti aĵojn, kion ni ne vere bezonas. Ĉu vi pasigas tro multe da tempo por pripensi, kiajn vestaĵojn vi bezonas surhavi ĉiutage? Ĉu vi aĉetis plurajn aĵojn, sed neniam uzas ilin? Ĉu vi sentas, ke vi ne povas ŝpari monon kaj vi devas pagi tro da fakturoj? Pripensu la demandojn, ĉu vi estas streĉita pri tia vivo? Tiukaze minimumistiĝo eble helpos vin!

Kio estas minimumismo? Kutima kaj simpla respondo estas, ke minimumismo temas pri forigi malnecesajn posedaĵojn. Efektive, minimumismo ne simple temas pri forigi posedaĵojn, sed ankaŭ enfokusigas pli pri kreado de pli da spaco por gravaĵoj de vi. La libro, kiun mi menciis antaŭe, «Minimumismo: vivu sencohavan vivon»[1] rimarkis kvin valorojn, kiuj rilatas sencohavan vivon; inkluzive de sano, interrilato, pasio, kresko, kaj kontribuo. Kiam oni forigas aĵojn, kiuj estas malatentigemaj kaj tempo-malŝparemaj, oni havos pli da tempo kaj spaco por la kvin valoroj.

Kiel iĝi minimumisto? Ĉiuj estas malsamaj, dependas de via decido, ĉar la aĵo, kiun vi forigus eble estas tiu kiun mi bezonus. Minimumistoj serĉas ĝojon ne pere de aĵoj, sed pere de la vivo mem. Pro tio, estas laŭ via decido kio estas necesa kaj kio malnecesa. La retejon mi rekomendas: theminimalists.com [2]. La retejo estas kreita de la verkistoj de la libro «Minimumismo: vivu sencohavan vivon»[1], Kiu havas plurajn informojn kaj rimedojn por subteni vin, se vi interesiĝas minimumistiĝi. Ekzemple, 30-taga minimumisma ludo.

4.1 La 30-Taga Minimumisa Ludo

Trovu iun ajn por komenci la ludon kune. Ĉiu ludanto forigas unu aĵon dum la unua tago, du aĵojn dum la dua tago, tri aĵojn dum la tria tago, kaj tiel plu ĝis 30 aĵojn dum la 30a tago! Ĉio estas inkluziva; kolektindaĵoj, ornamandoj, kuiriloj, elektroniko, mebloj, lito, vestaĵoj, mantukoj, kaj iaj ajn iloj. Kiu ajn daŭrigas la ludon pli longe, tiu sukcesas.

Se vi interesiĝas pri tio, ni ludu kune!

Citaĵoj

- [1] Joshua Fields MILLBURN kaj Ryan NICODEMUS. *Minimumismo: vivu sen-cohavan vivon*. Decembro 2011.
- [2] Joshua Fields MILLBURN kaj Ryan NICODEMUS. *La Minimumistoj*. <https://www.theminimalists.com/>. Vidite merkrede je la tridek-unua de marto 2021.

Ŝakludturniro

Dmitry LUŜNIKOV, vicprezidanto de EFNSK

Sabate je la deka de aprilo 2021 ĉe la Esperanta Domo okazos la unua ŝakludturniro sponsorota de Esperanta Federacio de NSK. La turniro komencos je 14:00.

Unua Premio	200 dolaroj
Dua Premio	150 dolaroj
Tria Premio	100 dolaroj
Kvara Premio	50 dolaroj

Reguloj:

- Ĉiuj ludantoj ludas du ludojn (blanka kaj nigra flankoj) kontraŭ ĉiuj aliaj ludantoj.
- 15 minutoj por ĉiuj ludantoj dum unu ludo.

Ĉiuj estas bonvenaj partopreni la turniron.

Registrado: www.meetup.com/Esperanto-in-Sydney/events/htntbsyccgbnb

Aŭ kontaktu Dmitry: dimlush@gmail.com





La Esperanta Federacio de Novsudkimrio

Ĉe la esperanta domo,
la unua dimanĉo de la monata estrarkunsido je 11:00, ĉiu sabato je 18:00.
Kontaktu Jonathan COOPER aŭ [04 0335 8941!](tel:0403358941)

Manlia Esperanta Klubo

Ĉe The Bavarian 2/5 Manly Wharf MANLY NSW 2095,
la unuaj kaj triaj sabatoj de la monato je 10:00.
Kontaktu Roger SPRINGER per [02 9976 6320](tel:0299766320) kaj [manly@esperanto.org.au!](mailto:manly@esperanto.org.au)

La Meza Marborda Grupo

La tria dimanĉo de la monato.
Kontaktu Joanne CHO per [02 4362 8287!](tel:0243628287)

Novkastelanoj

Kontaktu Andrew SPANNENBERG per [02 4951 2084](tel:0249512084) aŭ [newcastle@esperanto.org.au!](mailto:newcastle@esperanto.org.au)

La Suda Marborda Grupo

Ĉe BEGA NSW 2550.
Kontaktu Penny VOS per [02 6495 2922!](tel:0264952922)

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero

Ĉe Pancake Parlour 122 Alinga St CANBERRA ACT 2601 ĉiu jaŭdo je 17:00.
Kontaktu Huigh MALCOLM per [02 6288 4334](tel:0262884334) aŭ [huighm@gmail.com!](mailto:huighm@gmail.com)

Esperanto House
143 Lawson Street
REDFERN NSW 2016
AUSTRALIA
02 9319 4775
www.instagram.com/esperanto_nsw
www.facebook.com/EsperantoNSW
www.esperantohouse.org.au
nsw@esperanto.org.au

Prezidanto Andrew SPANNENBERG
Vicprezidanto Dmitry LUŜNIKOV
Sekretario Nicole ELSE
Kasisto Jonathan COOPER
Estraranoj Alan TURVEY, Adam LEVY

